

Universitato Adam Mickiewicz (UAM) Poznan, Pollando

Majo 2012

Mirejo Grosjean, Svislando

FAKO: ESPERANTO GRAMATIKO 1

Profesoro: I. Koutny

---

## UZADO DE PREPOZICIOJ

### Enhavo

1. Enkonduko, difinoj
2. Lokaj prepozicioj
3. Prepozicioj kun signifo kaj loka kaj tempa
4. Kun –n au sen –n
5. Kaptilo por franclingvanoj: kun / per
6. Ĉu Zamenhof eraris? Dank'al / danke al
7. La mirakla vorto *je*
8. Uzado de aliaj vortoj kiel prepozicioj
9. Uzado de prepozicioj por pliprecizigi verbojn kaj substantivojn
10. Uzado de prepozicioj por konstrui adverbojn, verbojn
11. Interesaj kunmetaĵoj
12. Rigardo al kelkaj aliaj lingvoj
13. Konkludo
14. Bibliografio

### **Enkonduko, difinoj**

Prepozicio estas vortkategorio, vortospeco, vortoklaso. Prepozicio staras plej ofte kun substantivo aŭ pronomo por precizigi la signifon lokan, tempan, kaŭzan, ktp. aŭ por indiki ligon inter la verbo kaj la objekto. Povas esti, ke ĝi staras kun infinitiva verbo, subfrazo aŭ adverbo. Povas esti, ke la prepozicio staras antaŭ la substantivo, aŭ post la substantivo, aŭ en ĝi aŭ ĉirkaŭ ĝi (en diversaj lingvoj, laŭ Faris) Ekzistas por la prepozicio post la substantivo la vorto postpozicio.

En la „Plena Gramatiko de Esperanto” oni legas: „Regulo 8:

Chiuj prepozicioj per si mem postulas la nominativon”.

Plie: „Regulo 6 el Reguloj ĝeneralaj:

Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon”

Laŭ la reta PIV: „Morfemo, kiu servas por dependigi substantivon aŭ pronomon (en Esperanto ankaŭ infinitivon) de alia vorto, kaj lokiĝas antaŭ la dependa vorto (ekz.: glaso el

kristalo, frapi per glavo, aŭdi pri io, plena de vino, kelke da domoj, akvo por trinki ks)". En tiu citaĵo mi rimarkas „plena de...” kaj tio sonas por mi francece. Mi preferas la uzon de la prepozicio *je*. (Vidu sube)

Laŭ la „Detala Gramatiko de Esperanto” de Wennergren, ĝi estas „rolmontrilo”. Tio signifas, ke ĝi montras la vojon, iom same kiel vektoro, vojmontrilo. Do temas pri praktika ero en la frazo, tre grava parto de la frazo, nemalhavebla por preciza esprimo.

Laŭ „reta-vortaro.de”: „Senfleksia vorto, kiu antaŭiras substantivan grupon (kun kerno plejofte substantiva, pronomo aŭ infinitiva) por indiki ties rolon rilate al verbo, substantivo aŭ adjektivo. → al, anstataŭ, antaŭ, malantaŭ, ĉe, ĉirkaŭ, de, da, dum, ekster, el, en, ĝis, je, kontraŭ, krom, kun, laŭ, malgraŭ, per, po, por, post, preter, pri, pro, sen, sub, super, sur, tra, trans”.

Laŭ vikipedio: „Prepozicio (aŭ rolvorteto) estas klaso de vorto, gramatika partikulo, kiu staras antaŭ alia vorto aŭ vortgrupo montrante, kian frazrolon tiu vorto aŭ vortgrupo havas en la frazo, aŭ kian rilaton tiu vorto aŭ vortgrupo havas al alia vorto aŭ vortgrupo de la sama frazo”.

Oni rimarku, ke en tri difinoj staras la vorto „antaŭ”, do oni povas dedukti, ke la tiel nomata normala pozicio de prepozicio estas ANTAŬ la substantivo aŭ simila vorto.

Prepozicio ne alprenas finaĵon.

Prepozicio ofte estas unusilaba vorteto, sed ne nepre. El 32 prepozicioj el la listo de „reta-vortaro.de”, 9 estas du- aŭ plursilabaj, 23 estas unusilabaj.

### **Lokaj prepozicioj**

Estas multaj: *en, sub, sur, super, ĉe, apud, trans, tra, laŭ, al, el, ĉirkaŭ, ekster, inter, preter...*

Ni rimarku, ke *laŭ* estas ne nur loka.

Loka *laŭ*: „li iras laŭ la vojo”.

Alia uzo de *laŭ*: „laŭ mi li eraras”.

Mi deziras emfazi strangaĵon en tiu listo. Temas pri la paro *sur-super* kaj la solulo *sub*. *Sur* signifas, ke estas kontakto inter la du objektoj: „la kato dormas sur la lito”. *Super* signifas, ke ne estas kontakto inter la du objektoj: „la lampo pendas super la tablo”. Por la solulo *sub* ne estas tiel. „En Kalifornio estas postulate, ke ĉiuj homoj gluu manĝaĵojn sub la tablon de la salono por povi manĝi ilin post rifuĝado tien en kazo de tertremo”. La manĝaĵoj estas ne sub la tablo sur la planko, sed ĉe la tablo, en kontakto kun ĝi. La prepozicio *sub* ne donas klaran indikon pri ekzisto de kontakto aŭ ne. (Vidu Wennergren p. 64)

### **Prepozicioj kun signifo kaj loka kaj tempa**

Ni citu *antaŭ, post, ĉirkaŭ, ĝis*.

*Antaŭ* en loka uzo: „la preĝejo situas antaŭ la superbazaro”.

*Antaŭ* en tempa uzo: „li foriris antaŭ la deka horo”.

*Post* en loka uzo: „post la poŝtoficejo vi vidis fontanon”.

*Post* en tempa uzo: „li eklaboros post la manĝo”.

*Ĉirkaŭ* en loka uzo: „la armeo batalas ĉirkaŭ la fortikaĵo”.

*Ĉirkaŭ* en tempa uzo: „estas ĉirkaŭ la deka horo”.

*Ĝis* en loka uzo: „li kuras ĝis sia domo”.

*Ĝis* en tempa uzo: „li restas ĝis noktomezo”.

### **Kun –n aŭ sen –n**

La substantivo aŭ pronomo post lokaj prepozicioj devas ricevi –n, kiam temas pri iro al alia loko, ŝanĝo de loko, direkto. „Li kuras en sian ĉambron”. „Li verŝis akvon sur min, tiel mi povis lavi min.”

Tio neniam okazas post *ĝis*, *al*, *el*, pro la fakto, ke tiuj tri vortoj ĉiumaniere esprimas lokoŝanĝon.

### **Kaptilo por franclingvanoj: kun / per**

En la franca lingvo la vorto *avec* havas la signifon de *per* kaj de *kun*.

„Il fait du bruit avec sa puissante voiture = li faras bruon per sia rapida aŭto”.

„ Il se promène avec son ami = li promenas kun sia amiko.”

La vorto *per* tre precize esprimas, ke oni aludas al ilo por ion fari. La vorto *kun* tre precize diras, ke io akompanas ion.

### **Ĉu Zamenhof eraris? Dank'al / danke al**

„Danke al la kontribuo de mecenato la societo povis dungi oficiston”. Klare tiu vortgrupo *danke al* funkcias kiel prepozicio. Kiam prepozicio konsitas el du vortoj, ekzistas en la franca lingvo la esprimo \*locution prépositive\*. Tion ni havas ĉi tie.

Laŭ la „Plena Gramatiko de Esperanto” nur la artikolo la kaj la finaĵo –o de la substantivo rajtas esti eliziigitaj. („Regulo 8 el Reguloj Ĝeneralaj: La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj antataŭanta de apostrofo”).

Do la zamenhofa esprimo *dank'al* ne sekvas tiun regulon. Strange! Zamenhof ne sekvas siajn proprajn regulojn.

Mi tute konsentas, ke por la oreloj kaj la laŭtlegado *dank'al* estas pli adekvata. Tamen mi decidis eviti tion, ĉar mi estas ofte en rilato kun aŭ komencantoj aŭ ekstereŭropanoj, por kiuj tiu iom stranga formo povas alporti problemojn.

### **La mirakla vorto JE**

Zamenhof havis elstaran ideon kreante tiun vorton.

Kiel prepozicio *je* alvenas, kiam ne estas iu preciza ideo de loko, de tempo, ktp.

„Je via sano”!

„Je la oka horo mi foriros”.

Aliaj uzoj de *je* estas multaj:

„La domo estas plena je vizitantoj”.

„Li estas preta je foriro”.

„Mi fieras je li!”

Ofte post adjektivo aŭ verbo devas sekvi iu ligilo, kiu ne havas ian signifon.

Ekzemple en la franca:

La maison est pleine de visiteurs.

Je suis prêt au départ.

Je suis fier de lui.

Ekzemple en la germana:

Das Haus ist voll mit Besuchern.

Er ist zum Start bereit.

Ich bin stolz auf ihn.

La lernanto de la franca kaj de la germana lingvoj penas lerni tiujn sensignifajn, tamen nemalhaveblajn ligilojn. La frazo sen la ĝusta ligilo estas erara. Zamenhof solvis la problemon elegante, inventante *je* por tiaj situacioj.

En la „Plena Gramatiko de Esperanto” oni legas: „Regulo 6 el Reguloj ĝeneralaj.

Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon; sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion *je*, kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio *je* oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio”.

### **Uzado de aliaj vortoj kiel prepozicioj**

„Sube de la domo estas kelo”.

La funkciado de tiu formulo *sube de* similas al prepozicio.

Aliaj ekzemploj:

„*Kompare kun* la ĉinoj la francoj ne fumas multe”.

Ĉi tie temas pri adverbo plus prepozicio.

### **Uzado de prepozicioj por pliprecizigi verbojn kaj substantivojn**

Ofte okazas, ke verbo ricevas pli trafan signifon ricevante prepozicion kiel prefikson.

„Li pripensas”.

„Ŝi surmetis belan robon”.

„Kio enestas en tiu tirkesto?”

El la franca proverbo „La nuit porte conseil” kaj la germana esprimo „Ueber Nacht kommt Rat” kaj la svisgermana formulo „Ich muss drüberschlafen” mi inventis la formulon:

„Mi devas pridormi tion” do mi ne diros tuj mian opinion, mi petas pri tempo por esplori ĉiujn aspektojn de tiu demando, propono, k.s. Tiu daŭro estu pli ol 24 horoj.

Substantivoj ricevas precizigon per antaŭe metita prepozicio:

*Subvesto*

*Kromedzino*

*Anstataŭanto*

*Subulo*

k.s.

### **Uzado de prepozicioj por konstrui adverbojn aŭ verbojn**

Okazas ofte, ke iu prepozicio ricevas adverban finaĵon.

*Sube, apude, kune...*

Okazas, ke iu prepozicio fariĝas verbo.

„Tiuj geamikoj kunas nun”.

„Ĉu vi poras aŭ kontraŭas?”

### **Interesaj kunmetaĵoj**

Aliĝilo

Ekalu! (Tiun vorton uzis denaska infano, kiam la gepatroj tro longe babilis antaŭ iu promenado).

## **Rigardo al kelkaj aliaj lingvoj**

En la germana ekzistas kvar kazoj. Pro tio la uzo de prepozicioj ne tiom oftas, ĉar la kazo ebligas precizigon jam.

La franca lingvo ne havas kazojn. Do ĝi abunde uzas prepoziciojn.

En la germana ekzistas postpozicioj: *entlang, nach ...*

„ Er geht dem Fluss entlang”

„Meiner Meinung nach war sein erster Film besser”.

En la japana uzatas postpozicioj por precizigi la lokon: *-ni, -de* por la loko kun signifo *en*.

„Poto ni kocha arimasu”. (poto = poto, kocha = teo, arimasu = estas) „En la poto estas teo”.

„Watashi wa kompjuta de shigoto wo shimas”. (watashi = mi, kompjuta = komputilo, shigoto = laboro, tasko, shimas = havas) „Mi havas laboraĵon en mia komputilo”.

Por indiki la subjekton venas post ĝi *-wa*, por indiki la objekton venas post ĝi *-wo*. En la libroj, kiujn mi legis, oni nomas ilin partikuloj. Oni same bone povus paroli pri postpozicioj. El la supraj difinoj de prepozicioj, nenio malebligas meti *-wa* kaj *-wo* en tiun kategorion. En la franca, germana kaj esperanto oni observas, ke la subjekto iel aperas nuda, kaj ke la aliaj frazeroj ricevas ian plian montrilon. En la franca la vortordo indikas la subjekton, la subjekto staras unue (parole) kaj maldekstre (skribe). Estas iel surprize vidi en la japana lingvo indikon *-wa* aŭ *-ga* por la subjekto.

Laŭ Faris ekzistas prepozicioj, kiuj sidas meze de la frazoparto, kaj aliaj, kiuj ĉirkaŭas la precizendan vorton. Mi ne konas tiajn situaciojn.

## **Konkludo**

En la trafiko bezonatas indikiloj. Prepozicioj utilas same. Nepras. Mi povas imagi, ke sen prepozicioj iu vortamaso similus al ia kaĉo, aŭ al ia beba babilado malmatura. En esperanto la prepozicioj estas plej precizaj. Tio estas giganta avantaĝo, en la momento, kiam oni verkas ian teknikan tekston ekzemple.

## **Bibliografio**

Zamenhof: „Plena Gramatiko de Esperanto” el „Unuaj libroj por esperantistoj” eldonejo Ludovikito, 1973

Wennergren: „Detala Gramatiko de Esperanto” ILEI, E@I, 2010

Diversaj retejoj

Fina noto:

Mia bibliografio estas mallonga, ĉar mi laboras for de miaj libroj (mi laboras en Japanio)